



je la supro de la "Faron" - monto  
en Tulono

# esperanto Provence

**kvaronjara gazeto de la Provenca Esperanto-Federacio**

**n° 101 - somero 2015**

## **federacia retejo**

[www.esperanto-provence.org](http://www.esperanto-provence.org)

## **nia federacio sur Facebook**

[www.facebook.com/  
esperantoprovence](http://www.facebook.com/esperantoprovence)

## **prezidanto**

Pierre Oliva

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

06 76 55 57 23

[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

## **baza kotizo por aliĝo**

**(kun la gazeto) : 6€**

ĉeko al :

"Espéranto-Provence"

pere de via loka asocio

aŭ sendota al la

## **kasisto**

Nicole Lafitte

2772 Montée du Vieux Camp

83330 Le Castellet

[nlpolecamp@gmail.com](mailto:nlpolecamp@gmail.com)

## **sekretario**

## **redaktoro kaj enpaĝiganto**

Pascal Vilain

61 Montée du Castelar

83460 Taradeau

06 42 19 68 51

[p.vilain83@orange.fr](mailto:p.vilain83@orange.fr)

**limdato por sendo de  
publikotaĵoj por la venonta n°  
25-a de Septembro 2015**

bonvolu sendi al la supra retadreso  
antaŭdankojn pro viaj kontribuajoj

## **Vorto de la Prezidanto**

Por ni, francaj esperantistoj, la nuna somero ne estas kutima periodo. Efektive, pluraj el ni partoprenos la Universalan Kongreson en Lillo. Jam aliĝis pli ol 2400 samideanoj el 72 landoj. Kia sukceso ! Atendas nin bela festo kaj la plezuro povi babili libere kaj gaje kun eksterlandanoj ! Mi esperas, ke multnombraj el vi partoprenos ankaŭ en diversaj aliaj staĝoj, ĉu en Francio ĉu alilande, por perfektigi sian lingvokonon. Ĉefe, mi deziras, ke ĉiuj membroj de nia federacio ĝuu kaj profitu la someron... kaj ankaŭ bone ripozu.

## **Federacia agado**

### **Kunvenis la komitato**

Dimanĉon la 21-an de Junio  
okazis en *Taradeau*  
komitatkunsido  
de *Espéranto-Provence*.

*El la 9 komitatanoj,  
6 ĉeestis*



El la diversaj pritrakitaj punktoj,

- **nia federacio havas nun 103 membrojn.** La alvoko "100 membroj" por la 100-a gazetnumero" estis do ne vana. Konsidere la fakton, ke iamaj fidelaj federacianoj ankoraŭ ne aniĝis ĉijare, ni eĉ povus esti ankoraŭ pli multnombraj ! Dankon al ĉiuj, kiuj membriĝis !
- ŝanĝoj en la Federacia retejo, pro kiuj *Franz Mimmersheim* estu varme gratulita. **La komitato instigas ĉiujn viziti kiel eble plej ofte la retejon, kies adreson vi povas legi komence de la apuda kolofono.**
- nuligo de la antaŭvidita postkongreso en nia regiono, post la UK en Lillo.
- kandidatigo de nia federacio por organizo de la UFE-kongreso, de la 5-a ĝis la 8-a de Majo 2016.
- FEI-ekzameno : okazis en Marsejlo la 14-an de Julio.
- diversaj aranĝoj, pasintaj (i.a. Esperanta Semajno en Marsejlo...) kaj venontaj (i.a. asociaj forumoj, staĝo en *Le Beausset*...)

## FEI - ekzameno

Dimanĉon la 14-an de Junio, de la 9-a ĝis la 12-a, 3 gekandidatoj el Marsejlo trapasis la Ateston pri Elementa Lernado, t.e. la unuagradan ekzamenon de F.E.I. (Franca Esperanto-Instituto).

Tiu ekzameno konfirmas seriozan studon de la bazoj de Esperanto kaj la kapablecon legi, skribi kaj paroli, por sin komprenigi kaj esti komprenata de nefranc-parolanto, ne tro erarante aŭ miskomprenante. Ĝi entenas skriban kaj parolan partojn.

Kvankam ni ne dubas pri la sukceso de la tri kuraĝuloj, ni atendu la oficialajn rezultojn sendotajn de F.E.I.



*Dankon al Thierry Spanjaard,  
kiu afable disponigis sian entrepenejon  
por la bona disvolviĝo de la ekzameno.*



### Pri FEI...

**Franca Esperanto-Instituto** estas komuna institucio de la du ĉefaj asocioj, *Espéranto-France* kaj SAT-Amikaro, kiuj sin dediĉas al instruado de Esperanto en Francio.

Ĝi estas je la dispono de ĉiu persono aŭ organizaĵo uzanta aŭ deziranta uzi Esperanton.

F.E.I. proponas ekzamensesiojn laŭ 4 gradoj : 1-a > Atesto pri Elementa Lernado ; 2-a > Atesto pri Praktika Lernado ; 3-a : Atesto pri Supera Lernado kaj Atesto pri Kapableco ; 4-a : Diplomo pri Altaj Esperantaj Studoj.

Por scii pli : <http://www.franca-esperanto-instituto.net>

## Baldaŭ en nia federacio...

### Asociaj forumoj

En *Manosque* (04), sabaton la 5-an de Septembro  
inf. *Jean-François Bettus* 06 84 88 13 91

En *Marseille* (13), dimanĉon la 6-an de Septembro.  
inf. *Thierry Spanjaard* 04 91 71 82 24 aŭ 06 09 18 28 51

En *La Ciotat* (13), sabaton la 12-an de Septembro.  
inf. *Renée Triolle* 04 42 71 42 74

En *Le Beausset* (83), sabaton la 12-an de Septembro.  
inf. *Pierre Oliva* 06 76 55 57 23

En *Fréjus* (83), je dato ankoraŭ ne konata.  
inf. *Monique Prezioso* 04 94 83 06 88

### Staĝoj

En *Le Beausset* (83),  
28-an kaj 29-an de Novembro  
staĝo organizota de *Nicole Lafitte* kaj *Pierre Oliva*,  
nome de nia federacio

En *Les Issambres* (83),  
de la 5-a ĝis la 12-a de Marto 2016  
Mediterranea Esperanto-Semajno,  
organizota de  
*Christine Graissaguel* kaj *Monique Prezioso*,  
nome de la grupo *Fréjus / Saint-Raphaël*

por ambaŭ eventoj : informoj kaj aliĝiloj  
en la aŭtuna numero de via gazeto

**Esperanto  
tago**



La 26an de Julio, Esperanto-parolantoj celebros la naskiĝtagon de la internacia lingvo.

Sed ĉu la ekstera mondo scias pri tio ?

Verŝajne ne !

Pro tio **Esperanto-tago**.

## El niaj federaciaj asocioj



### 04 - E.K.E.M. - Esperanta Kulturo en Manosque

**6 juin** > José Grammatico s'est rendu à la mairie de Manosque pour représenter EKEM à la cérémonie d'accueil des nouveaux arrivants. Ces derniers, à cette occasion, reçoivent des documents sur l'espéranto.

**27 juin** > stand espéranto à « Manosque à l'Asso ».

**24 septembre** > dans le cadre des « Correspondances de Manosque », EKEM tiendra un stand de 10h à 16h devant la poste : "Komuniku per Esperanto".

(correspondance avec quelques phrases en espéranto, accueil des scolaires, réalisation d'affiche(s), textes, photos de la région...

**26 septembre** > participation à la Journée Européenne des Langues : Porte Ouverte sur l'Espéranto à la Maison des associations, de 10h à 16h30. (expo, librairie, discussion, mini conférence, film, lecture bilingue... pot de l'amitié.

### Temps d'activités périscolaires :

- Sainte-Tulle : une réunion a eu lieu fin juin pour le bilan (correspondance avec la Lituanie) et une éventuelle reconduction de l'espéranto pour le 1er trimestre 2016. .

- Manosque : après un refus en 2015, nouvelle proposition pour 2016.

- Les Combes : un tout dernier envoi à la classe du Japon a été effectué, l'instituteur souhaitant changer de pays l'an prochain, avec une correspondance plus régulière.

*article de Haute-Provence Info, le 7 mai, sur les élèves de Sainte-Tulle qui découvrent l'espéranto dans le cadre des TAPs.*



### 13 - Espéranto - La Ciotat

#### Festivalo de dividita poezio

Dum kvar tagoj, de la 16-a ĝis la 19-a de Aprilo, *La Ciotat* venigis poetojn, kiuj ne nur deklamis sed ankaŭ verkis surloke. Sabaton, la 18-an, okazis vespero pri dividita poezio ; la homoj "dividas " la rolojn : iu legas la originalon en fremda lingvo, dum alia legas la francan tradukon aŭ simple klarigas la temon. Tiel eblis aŭdi poeziaĵojn en la germana, angla, itala, hispana, portugala, japana, rusa kaj ĉina lingvoj.

*Renée Triolle* ne maltrafis la okazon aŭdigi Esperanton. Ŝi elektis majstran verkon de nia Esperanta poezio, la poemon de *William Auld*, " La Infana Raso". Tiu longa poemo esploras la rolon de la homaro en la tempo kaj la kosmo kaj la ĉapitro XIII pri religio finiĝas per :

*se vi supozas  
ke mortigado de la homoj  
ĉesigos kritikojn  
pri via misagado,  
io mankas al via rezonkapablo*

Plian fojon, la trideko da aŭskultantoj miris pri la beleco, flueco kaj melodio de la internacia lingvo. Dum la paŭzo estis ebleco private respondi al interesitoj.

#### Alternatiba

*(klarigoj sur la sekva paĝo)*

Simpatia aranĝo merkredon la 24-an de Junio ekde la 17-a : diversaj budoj de jam konataj asocioj (mi konis 90 % de la homoj, kaj reciproke, kaj kisis 60% ! Nur du ne estis konataj ĉar ili venis el Marsejlo : pri elektro kaj paralela banka sistemo).

Vizitantoj estis ĉefe la homoj de la diversaj asocioj aŭ la manpleno da urbanoj, kiuj partoprenas ĝenerale tiajn aranĝojn.

Mi havis flagon kaj alparolis diversajn homojn (kelkajn junulojn, kiuj produktis fruktosukon, biciklante por produkti elektron).



*"Alternatiba" en La Ciotat kun la bone videbla flago 'Esperanto'*

## Kio estas *Alternatiba* ?



*Alternatiba* estas tutmonda civitana movado de priklumata mobilizado kun ĉirkaŭ 70 alternativo-vilaĝoj nun organizataj aŭ jam okazintaj. Dume, *Alternatiba*-Turneo trapasos 5 000 km por la klimato sur kvarlokaj bicikloj en 187 Eŭropaj etapoj, de la 5-a de Junio ĝis la 26-a de Septembro 2015.

por scii pli : <https://alternatiba.eu/eo>



## 13 - Centre Culturel Espéranto Marseille

Lundon la 11-an de Majo, ĉe la Marsejlo-regiona «*Radio Dialogue*», la ĉiusemajna elsendo "Morgaŭ la Tero", de *Jacline Crousier*, temis pri nia lingvo : "Esperanto, ĉu lingvo de paco aŭ nur komunikilo?".

Partoprenis *Jeanine Ratouchniak* kaj *Thierry Spanjaard*.

Por aŭskulti tiun radion : 89.6 MHz (*Marseille, Aubagne*) kaj 101.9 MHz (*Aix, Etang de Berre*).

### Marsejla Esperanta Semajno

La « Marsejla Kultura Esperanta Centro » decidis antaŭ kelkaj monatoj organizi grandan eventon en la urbo, celante interesi pli da homoj pri Esperanto. Nia grupo ne estas vere granda kaj ni daŭre esperas pligrandigi ĝin.

La Marsejla Esperanta Semajno okazis fine de Majo 2015 kaj enhavis :

1- Rapidan prezentadon de la lingvo  
*Albert Mouren (foto 1)*

2- Prelegon pri la lingvaj problemoj en Eŭropo  
*Pascal Vilain (foto 2)*

3- Montradon de mallongaj filmoj pri kaj en Esperanto - *Thierry Spanjaard (foto 3)*

4- Infanatelieron - Marsejla grupo (*foto 4*)

5- Atelieron pri «maki»-preparado  
*Flavie Audibert Wakako (foto 5)*

6- Piknikon en parko (*foto 6*)

7- Urban piediradon

8- Ekspozicion pri «Esperanto kiel rimedo al la lingva hegemonio», dum la tuta semajno (*foto7*)



3



7



6



5



4



1



2

Aliaj fotografaĵoj pri la evento estas videblaj ĉe la TTT-ejo : [esperanto.marseille.over-blog.com](http://esperanto.marseille.over-blog.com)

Fakte, neniu el la partoprenintoj jam decidis aliĝi niajn kursojn. Sed la evento provizis nin per novaj kontaktoj. Pluraj junaj homoj tiel malkovris la internacian lingvon kaj ĝian kulturon kaj interesiĝis pri la Esperanta movado. Krome, la Marsejla Esperanta Semajno estis bona okazo renkonti multajn Provencajn esperantistojn.

Fakte la regiono estas granda kaj ĉiu estas okupata, do la oportunejoj interrenkonti ne abundas. Ene de la Esperanto-Movado, nia Marsejla Esperanta Semajno estis vidita de multaj homoj en multaj lokoj kaj evidentiĝis, ke ni estas agemaj en la dua urbo de Francio.

*raportis T. Spanjaard kaj la Marsejla grupo*



### 83 - Esperanto-Klubo Fréjus / Saint-Raphaël

Du kutimaj aranĝoj kunigis fidelajn klubanojn kaj geamikojn, kiuj, post komuna manĝado, havis la eblon praktiki Esperanton danke al ludoj, kvizoj, ŝercrakontoj, k.t.p.



*ĉe "Base Nature" en Fréjus,  
la 24-an de Majo*



*en la restadejo Val d'Esquière,  
en Les Issambres, la 28-an de Junio*



### 83 - Espéranto - Le Beausset

Por prepari la Universalan Kongreson, kiu okazos ĉisomere en Lillo, *Pierre Oliva*, kiel helponto, kaj *Nicole Lafitte*, kiel ĉiĉeronino, partoprenis staĝon en Kvinpetalo en Majo. *Anne Amblès*, fakulino pri turismo, homaj rajtoj kaj trejnado, gvidis la staĝon. Ĉeestis ankaŭ 17 aliaj samideanoj el diversaj regionoj, ĉefe el Parizo kaj Norda Francio. La staĝa enhavo estis tre kompleta kaj la etoso tre amikeca.

Ankaŭ *Renée Triolle* zorgos pri diversaj ekskursoj ; plurfoje ŝi trajne vojaĝis al la Lilla regiono por tion prepari.

Ekde la venonta jaro, ĉu ne estus bona ideo organizi turismajn ekskursojn en nia bela Provenco ?



*du el la artaĵoj de Bernard*

#### Ekspozicio

En Junio, *Bernard Briançon*, kiu lernas Esperanton de ok monatoj, profesie ekspoziciis en Parizo. Por danki sian klubon «*Espéranto - Le Beausset*», li Esperante titolis ĉiujn artaĵojn siajn.

*Bernard* estas profesoro pri belarto en la Marsejla universitato, kaj ĉefe artisto.

Lia ekspozicio, kies temo estis «*vojaĝo en urba ĝardeno*», okazis en «*Galerie des instants volatiles*» (158, rue de Charenton, 75012 Paris)

Menciindas, ke *Susanna Beglaryan*, kunordigantino de la sidejo de *Espéranto-France*, vizitis ĝin.



*laboretoso en la Kvinpetala staĝo*



### Tradicia pikniko

#### Frاندaj manĝaĵoj de la Mondo"

(kutima evento organizita de la "ESC Croix-des-Oiseaux")

La 26-an de Marto, virino el Reunio preparis tutan manĝaĵon el sia lando kaj regalis nin.

La 4-an de Junio, ni manĝis laŭ la Afrika kuirarto.

*raportis Johanino*

Ĝi okazis dimanĉon la 21-an de Junio en *Saint-Antoine*, vilaĝeto de la urbo *Isle-sur-Sorgue*, laŭ la jena programo :

- matene : vizito de la "Muzeo de la iama lernejo", kun partopreno en ateliero "video-debato" pri la temo : "La tago de infano, hejme kaj en la iama lernejo".

- tagmeze : pikniko

- posttagmeze : post siesteto, vizito de la "Muzeo de la pupoj kaj de la antikvaj ludiloj".

*informis la n° 68 de "Avignon-Espéranto".*

### Aliloke en nia federacia regiono

#### Transdono de la atesto «Esperanto-vilaĝo» okaze de oficiala ceremonio en Taradeau (83)

La 15-an de Januaro 2015, okaze de la tradiciaj urbestraraj bondeziroj por la nova jaro antaŭ la tuta loĝantaro de *Taradeau*, *Pascal Vilain* oficiale - kaj finfine ! - transdonis la ateston pri Esperanto-vilaĝo en la manojn de la urbestro, *Gilbert Galliano*.

Kial finfine ? Nu, tiu atesto estis ĉe ni jam de pluraj jaroj - Ne, ne, mi ne eraras ! Temas ja pri jaroj kaj ne pri semajnoj aŭ monatoj ! - Pli precize, ĝi jam troviĝis ĉe ni de kvin jaroj... ! - En la daŭro de tiu tempo, *Pascal* plurfoje petis «oficalan okazon» por transdoni tiun verdstelan ateston... Kompreneble, eblis simple kaj senceremonie transdoni la ateston jam delonge, sed ĉiuj ja scias, ke tiuokaze neniu plu estus parolinta aŭ eksciinta pri tiu evento, ĉar tute simple la dokumento estus malaperinta ien, en iun profundan tirkeston... aŭ eĉ rubujen... imagu !

Nu, estas vere, ke la urbestrararo havis multajn aliajn nepre solvendajn problemojn enkape... Okazis ja la inundoj en nia vilaĝo, dum kiuj nia - kutime mallarĝa - *Florieye* kunportis kvar domojn, du pontojn kaj dekojn da aŭtomobiloj ! Do, necesis unue rekonstrui...

La tempo pasis... Okazis i.a. novaj balotoj kaj multaj aliaj eventoj. *Pascal*, renkontante iujn oficialulojn, ja ĉiam ree memorigis al ili, ke iu certa atesto daŭre estas en nia posedo... sed por akcepti la titolon de "Esperanto-vilaĝo", vere neniel troviĝis tempo...

Tamen, fine la fama Zamenhofa "guto post guto, konstante frapante..." efikis ! Estis subita, neatendita

sonoro ĉe nia dompordo, kelkajn horojn antaŭ tiu oficiala vesperprogramo : vilaĝa konsilanto proponis - okaze de la diverslingvaj jarŝanĝaj deziroj, kiuj tradicie okazas ankaŭ en Esperanto - profiti la okazon por samtempe transdoni tiun ateston... kiel surprizon por la urbestro !

Do, *Pascal* - pripensante ke tiu simpla dokumento ankoraŭ pli rapide riskus malaperi dum tia grandskala, oficiala aranĝo - bele enkadrigis ĝin... - Kadron oni ja ne same facile malaperigu, ĉu ! - Kaj jen bela, ceremonia donacsurprizo por la urbestro...

Estis nur bedaŭrinde, ke ne eblis inviti niajn samklubanojn partopreni en tiu aranĝo... Aliflanke, tiom gigantan eventon por oficiala transdono de Esperanta stelo, ni tute ne povis antaŭvidi, eĉ ne en niaj plej fantaziaj revoj !



En la vilaĝa festosalonego troviĝis amaso da homoj, el inter kiuj multaj estis "oficialaj gravuloj" : nia deputito, nia departementa konsilistaro, urbestroj kaj konsilianoj de najbaraj vilaĝoj kaj urboj...

Fine de la programo - dum kiu parolade esprimis sin nur la urbestro - okazis la antaŭe menciitaj plurlingvaj salutoj kaj novjardeziroj el la ĉeestantaro. Plej laste oni invitis *Pascal* sur la podion... Li transdonis esperantlingvaj salutojn/dezirojn kaj klarigis pri la enmana atesto de Esperanto-vilaĝo. Krome li profitis la fakton, ke li estis ĉemikrofone por menci, ke ekzistas pacparola versio de nia nacia himno... - aj, aj, danĝera afero ! - lanĉis la proponon estonte nomumi Esperanto-straton, ĉar tio ja ekzistas en multaj lokoj sed ne ankoraŭ en *Taradeau*... aŭ kial eĉ ne nomi la novekonstruatan ponton : «*Esperantoponto-n*», kiel belan simbolon de interfratiĝa pacoponto... - specife ĵus post la bedaŭraj okazaĵoj de la lastaj tagoj (*la atako en Charlie-*

*Hebdo okazis la 7-an de Januaro*) - antaŭ ol oficiale enmanigi la enkadrigitan donacon al la urbestro... Tiu ĉi lasta, ĉemikrofone, promesis, ke la atesto ricevos surmuran lokon en la vilaĝa konsiliejo, kaj ke la ideo de strato Esperanto estas pripensebla afero... Tamen, la afero pri bapto de la nova ponto kiel Esperantoponto neniel koncernas lin, ĉar temas ne pri vilaĝa sed distrikta posedaĵo...

La fakto atendi jarojn por oficiala transdono de Esperanto-atesto finfine do evidentiĝis tre pozitiva ! Kiu scias..., ĉu eble la sekva Zamenhofa «guto post guto...» zorgos pri nova ZEO-o... ?

raportis Mari-Roza Vilain



transdono de  
la enkadrigita atesto



multaj homoj  
ĉeestas la eventon



### Kio estas ZEO-o ?


ZEO-oj estas Zamenhof/Esperanto-objektoj, t.e. stratoj, placoj, monumentoj, tabuloj kaj aliaj objektoj honore al Zamenhof aŭ Esperanto. (info : Vikipedio)

En la sekvaj numeroj de via gazeto, vi povos legi pri la ZEO-oj en nia PACA-regiono.

## Allogaj Marsejlaj fjordetoj

La fame konata revuo «*Monato*», en sian aprilan numeron, aperigis artikolon pri «naturismo», kune verkitan de *Thierry Spanjaard* kaj de Marsejla amiko lia, *Bruno Saurez*, prezidanto de la loka naturista asocio.

*Jen teksto, kiun skribis pro nia gazeto François Degoul, organizinto de plurtaga piedirado, kiu okazis en tiu loko, pri kiu skribis Thierry S. en Monato.*



Gratulojn al ili kaj dankojn pro ilia emo konigi al ni la historion de pli ol centjara vivmaniero de kelkaj ŝatantoj de bela naturo, tiu de la marbordaj sovaĝejoj, kiuj antaŭ nelonge iĝis la Nacia Parko de la Provencaj Fjordetoj.

*Kompreneble, ne nur naturistoj promenas en la marborda regiono, kiu iras de Marseille al Cassis. Eblas renkonti tie ankaŭ... esperantistoj ! Jes ja !*

Inter la vendredo 27-a de Marto kaj la ĵaŭdo 2-a de Aprilo, ni okope migradis tra la fjordetoj kaj rosmarenejoj de la regiono *Marseille - Cassis*. Unu el ni venis el Belgio, alia el *Lausanne*, la aliaj el Francio, interalie Loreno. Viglajn rememorojn ni konservas de tiu sperto, tiel riĉenhavajn, ke por ne ĉion tede rakonti, mi nur komentos ses fotojn, kiujn mi sendas al via gazeto... inter ili via redaktoro decidis kiu(j)n el ili li publikigos. Nur vi, legantoj, scias tion.

La unuan tagon de piedirado, tuj montriĝis la diverseco de fizikaj niveloj en nia grupo. Tial, post iom pli ol unu horo da komuna suprenirado sur ŝtona vojeto, mi lasis *Guy* kaj aliajn sportemulojn iri kaj reveni ĝis *Col de la Galinette* dum mi atendis la lastajn... sed jam ili revenis kiam mi devis klarigi al Monika la rendevulokon, apud *Calanque de la Mounine*, kie ni ĉiuj retroviĝos. Unu foto<sup>1</sup> ilustras tiun kolokvon. Feliĉe, Monika vere ĝojis atendi nin kvar horojn en meditado lulita de la pina susuro kaj de la bluegaj marondoj, dum ni iris ĝis la fjordeto de *Marseilleveyre* por pikniki.

Post la nefacila reveno de ĉiuj al *Callelongue*, Guy kaj kelkaj piediris ĝis la ventegumita *Cap Croisette*, dum mi gvidis aliajn en la apuda valetto *Saint-Michel* kaj la pitoreska vilaĝeto *Callelongue*, kie ni fotis <sup>2</sup> belege koloritan domenirejon, sur kiu okcitane legiĝas «*sian pas pressa*», («nenio urĝigas nin», france : «*nous ne sommes pas pressés*»).

La duan tagon, ni sepope iris ĝis la fjordeto de *Sugiton* kaj la apuda fjordeteto, malfacile atingebla, kiel montras la foto <sup>3</sup>, kie *Catherine* malgrimpas la lastan rokon, dum sube mi atente pretas haltigi ŝian eventualan glitfaladon...

La trian tagon, pro la granda vento, ni libere organiziĝis. Kelkaj vizitis *Marseille*, dum mi kaj aliaj turismis en *Cassis*, kie post promenado apud la fjordeto de *Port-Miou*, ni kune frandis la lokan fiŝsupon, la faman «*bouillabaisse*» (foto <sup>4</sup> de nia tablo).

fotoj : 1 - 2 - 3

4 - 5 - 6



La kvaran tagon, ni ĉiuj revenis ĉirkaŭ *Cassis*, traŭrante sub fortega vento la rosmarenajn ebenaĵojn, poste la krutan vojeton balkonan supre de la mirinde kolorita pejzaĝo : la profunda fjordeto de *En-Vau*, tiel lazure blua sub la verdaj malhelecoj de la pinoj... sed per foto<sup>5</sup> sugestis la venton ne facilas : nek la mano al la ĉapo nek la klinigitaj pintoj de la cipresoj produktas la fridan kaj forte bremsan efikon fizikan de tiu «*mistral*». Tamen post haltoj en la ŝirmita fjordeto de *Port-Pin* kaj la paradiza gastejo de *La Fontasse*, ni sukcesis trovi niajn aŭtojn.

Ankaŭ la kvinan tagon la vento ege blovis, kaj ni tie kaj tie evitis ĝin sur la suda flanko de la montaro *l'Etoile*, tiel tipa de la mediteraneaj pejzaĝoj, kun ĝiaj ŝtonetaj vojetoj meze de apenaŭ arbutitaj montetoj kaj ebenaĵoj, meze de kiuj sur nia foto <sup>6</sup> ripozas *Liliane*...

Tian aranĝon mi verŝajne reokazigos en Oktobro 2016. La organizanto : *François Degoul* 01 48 58 71 94, [frdegoul@wanadoo.fr](mailto:frdegoul@wanadoo.fr)

*Sur pluraj fotoj, mi plezure revidis amikon mian el la Norda regiono : Guy Perrin, kiu iam estis membro de mia Esperanto-asocio en Dunkirko.*

*Privata mesaĝo al li : "Guy, legante ĉi tiun gazeton, vi eble pli facile komprenos, kial mi neniam akurate resendas al vi viajn taskojn !"*

*Pascal*

## Diversaj novaĵoj pri samfederaciaĵoj

Okaze de la lasta ĝenerala kunveno de "*Espéranto-Info*" en *Sainte-Enimie*, **Nicole Lafitte** kaj **Pierre Oliva** iĝis membroj de la administra konsilio de tiu asocio.

En la samnoma dumonata gazeto "*Espéranto-Info*", **Claudie Demongeot** kaj **Robert Allandrieu**, zorgos de nun pri rubriko "*Un p'tit cours pour débutants par Claudie et Robert*", kun "Paca", kiun ni regule retrovos.

por scii pli pri la gazeto : [www.esperantoinfo.info](http://www.esperantoinfo.info)

Pri *Claudie* kaj *Robert*, ĉu vi scias, ke ili zorgas ankaŭ pri la asocio "*Réinsertion et Espéranto*" ?

Vidu la TTT-ejon de la asocio :

<http://www.reinsertionetesperanto.com/>

La 27-an de Majo, **Monique Arnaud** efike kaj videble reprezentis nian federacion okaze de la omaĝo al *Jean Zay* en Parizo.

Dume, alia amiko, **Alain Rémy**, plu kaj plu pedalas sur la Eŭropa vojaro. Tiuj, kiuj partoprenos en la Lilla Universala Kongreso, post kelkaj tagoj, verŝajne retrovos lin tie.





## L'espéranto pour les objectifs du Millénaire de l'UNESCO

Parmi les 8 points essentiels des objectifs du Millénaire fixés par l'ONU, l'espéranto participe évidemment à l'alphabétisation et l'éducation pour tous tout au long de la vie, mais de façon plus inattendue à la réduction de la mortalité infantile !

C'est sur ce point, l'utilisation des feuilles de taro pour lutter contre l'anémie des bébés africains, que Monique Arnaud, de Gap, est intervenue au Troisième colloque international sur l'enseignement de l'espéranto à Neuchâtel (Suisse) du 14 au 17 mai en présentant le livret conçu en espéranto par les Africains dans une série éducative de l'UNESCO.

Les conclusions sur l'enseignement de la langue internationale à l'école vont toutes dans le même sens: tremplin pour l'étude des langues, développement de la logique en mathématiques, ouverture sur le monde en histoire-géographie, renforcement de la connaissance de la langue maternelle et confiance en soi.



Le Dauphiné Libéré - 24-an de Majo

### Malĝojiga novaĵo

Georges Kersaudy nous a quittés.

Vous avez certainement eu entre les mains le livre "Langues sans frontières", édité par Autrement-frontières 2001. L'auteur, c'était lui, Georges Kersaudy, ancien fonctionnaire international qui parlait, écrivait et traduisait une cinquantaine de langues d'Europe et d'Asie. Son ouvrage " A la découverte des langues de l'Europe" présente non seulement un inventaire des langues de l'Europe avec leurs alphabets, grammaires, extraits d'un texte mais aussi les problèmes linguistiques de l'Europe d'aujourd'hui et fait une large part à la solution de la langue internationale espéranto, garant de l'égalité parfaite entre les langues officielles.

Tous ceux qui aiment les langues s'associent aux espérantistes pour présenter leurs condoléances à sa famille.

Sekve, kial la samaj konkludoj post cent jaroj (la dua kolokvo okazis en 1920) ? Kial, post la raporto de François Grin (relegu ĝin ĉe *Documentation française*) regas daŭra ignoro pri la avantaĝoj de Esperanto ? Kial ministroj pri edukado, invititaj de la Ministro pri Edukado de la ŝtato Neuchâtel, ne respondis ?


El Provenco partoprenis tiun aranĝon du instruistinoj, (Monique A. kaj Renée T. ndlr), kiuj ambaŭ instruis lingvon (anglan kaj rusan). Mankas nuntempe katedroj por trejni esploristojn kaj universitatanojn kaj tute evidentiĝis, ke la brilaj prelegantoj estis ĉiuj trejnitaj en la universitato de Budapeŝto far prof. Szerdaheli (Katalin Kovats, Ilona Koutny, Szofia Korody, Istvan Ertl, ktp). Tamen, Hungario, kiu estis modelo por instruado de Esperanto, konsiderata samnivela kiel iuj ajn naciaj lingvoj, lasas pli kaj pli da loko al la angla.

Junaj lernantoj de Freinet-lernejo " La granda ursino" servis kafon kaj kukojn dum la paŭzoj kaj eĉ ludis teatraĵeton, kiun ili mem verkis. Ili lernas en idealaj kondiĉoj : 12 lernantoj en unu klaso kaj nur 24 en la tuta lernejo !

Dankojn al Mireille Grosjean, prezidanto de ILEI, al la urboj Neuchâtel kaj La Chaux-de-Fonds, kiuj organizis kaj gastigis la aranĝon.

La raporto kun unuopaj intervenoj estas legebla ĉe Vikipedio.

raportis Renée Triolle



## Poezio el ĉiuj ĉieloj

Kun la patroneco de la Komunumo *Sankta Anĝelo de Brolo*, en Mesino (Sicilio – Italio) kaj de la Itala Esperanto-Federacio, estis anoncita la dua eldono de la senpaga konkurso «Poezio el ĉiuj ĉieloj».

Tiu ĉi konkurso naskiĝis en Italio, danke al iniciato de itala esperantisto.

Italio, krom la antikva Romo kaj la mallonga frenezo dum la komenco de la dudeka jarcento, ne havas imperieman tradicion, ne trudas propran lingvon al la mondo per armiloj aŭ ekonomia potenco, ne martelas la mensojn de Usonanoj, Eŭropanoj, Afrikanoj kaj de hindoj per kantaĵoj kaj sloganoj. La mirinda itala lingvo, kiu ne estas laŭmoda en la parolado de la politikistoj kaj arogantaj pseŭdo-intelektuloj, iris tra la mondo nur kun la elmigrintoj kaj artistoj. La italaj civitanoj, kiel multaj aliaj, kapablas kompreni tre bone, kio estas la perforta kultura invado, ĉar ili jam suferas pro tio ; li bone kapablas kompreni la rolon de neŭtrala lingvo por perado, kiu respektas ĉiun kulturaĵon, kaj estas konceptita por la frateco kaj harmonio inter popoloj. Kiu diras, ke ĝi ne estas bezonata, ĉar oni havas la anglan aŭ la ĉinan lingvojn, tiu estas kulture jam tiom regata kaj envultata por ne percepti, ke oni estas minacanta lian identecon kaj apartenon. La lingvo-milito, kiu estas parto el pli vasta konflikto por superregado, kaj pasee kaj nun, estis historio de violento kaj perfortado. Tio neniam povos porti la pacigon kaj la plenan, reciprokan respekton inter popoloj.

Do, tiu ĉi konkurso originas el amo por la poezio kaj el amo por la libereco de ĉiuj gentoj, kiun Esperanto simbolas. Ĝi direktiĝas al italaj poetoj kaj, per Esperanto, al ĉiugentaj poetoj. *Poesia da tutti i cieli*. Poezio el ĉiuj ĉieloj.

(el : <http://iconcorsidisamideano.altervista.org>)

**Anita Collomb**, federaciano kaj membro de la klubo de *Fréjus / Saint-Raphaël*, partoprenis en ĝi kun poemo, «**Himno al la virino**», kiun ŝi, kune kun aliaj staĝantoj, deklamis okaze de la lasta M.E.S. en *Les Issambres*.

Jen ĝi :

Inoj el ĉiuj landoj  
Inoj devigataj al edziniĝo ekde infaneco  
Inoj oftege gravedaj  
Inoj sklavaj, humiligitaj, lacegaj,  
Submetitaj al la vira leĝo  
Inoj batitaj, fororbitaj, perfortitaj,  
Prostituitaj por la vira plezuro

Hindinoj vivbruligitaj laŭ satio  
Afrikaninoj ekscizitaj,  
Je aidoso infektitaj,  
Islamaninoj neniigitaj, repudiitaj, ŝtonumitaj,  
Inoj malsataj, el la Tria Mondo  
Aŭ el aliaj lokoj  
Vidantaj siajn infanojn mortantajn, sen helpo.

Kuraĝaj inoj el Hindujo kaj Afriko  
Helpataj per mikrokreditoj  
Regataj de kooperativaj asocioj  
Plibonigantaj iliajn familiajn vivkondiĉojn.  
Inoj, liberigitaj sed minoritataj  
Bonvolulinoj en Afganujo,  
Kaŝe edukante knabinojn,  
Fratulinoj kiel Emanuela aŭ Tereza  
Inoj el la tuta mondo : unuiĝu !  
Ekparolu por la paco  
Kaj la solidareco !  
Inoj : tenereco, delikateco  
Ino floro, mia fratino

Inoj kurdaj, batalantaj kontraŭ « ĝiad »  
Inoj el Palestino kaj Israelo, lititaj favore  
Al paca akordo  
Inoj el ĉiuj rezistadoj  
Ekde Olympe de Gouges ĝis Simone Veil, Maala Nobel-Pacpremiita  
Sufragetoj, akirintaj balotrajton  
Inoj, kapablaj regadi : Indira Gandhi, Benazir Butto, Eva Peron,  
Dina Rousel, Aung Son Su Kyi

Mi revadis pri alia mondo,  
Kie la inoj estus restarigitaj en sia altrangeco  
Estimataj pro siaj kvalitoj de pacifismo  
liberaj kaj respondecaj  
mi revas pri mondo regata per ina principo bazita sur  
MEF : Malneta Enlanda Feliĉo  
Same kiel en Butano  
Reala demokratio favora al vivo  
Nek al konkero, nek al financo,  
Krom por la elementaj bezonoj de ĉiuj civitanoj  
Ino, estonteco kaj ŝanco de la homaro

## Paĝo de la komencantoj

### teksto en facila Esperanto

Multe da homoj estas en la granda teatro<sup>(1)</sup>.  
Sur la scenejo<sup>(2)</sup> staras bela fraŭlino. Ŝi estas tre kuraĝa, ĉar apud ŝi sidas granda leono. Ŝi tenas pecon da sukero inter la ruĝaj lipoj kaj vokas la leonon. Ĉi tiu venas kaj prenas la sukeron per<sup>(3)</sup> sia buŝego.  
"Ho, ankaŭ mi povas fari tion ! diras sinjoro en la salono.  
- Ĉu vere ? Ĉu vi, malforta junulo, povas fari tion ? demandas la fraŭlino ?  
- Jes, mi estas same kuraĝa kiel la leono !"

### klarigoj

- (1) **kaj**<sup>(2)</sup>  
teatro / teatrejo ? sceno / scenejo ? kino / kinejo ?  
"ej-" estas sufikso, kiu montras lokon  
Por scii, kiam uzi ĝin, vi bone konu la signifon de la baza radiko.  
a) teatro = konstruaĵo, en kiu oni prezentas spektaklojn. Do, teatro estas jam "loko". Vi ne uzu la sufikson "ej-".  
b) sceno = divido de akto en verko destinita al teatra prezentado.  
Do, sceno ne estas loko. Vi uzu la sufikson "ej-" por la loko, kie la aktoroj ludas : scenejo.  
c) same, kino = filmarto  
Do, kino ne estas loko. Vi uzu la sufikson "ej-" por la loko, kie oni prezentas filmojn : kinejo.  
- (3) : kun aŭ per ?  
ambaŭ tradukas la francan "*avec*".  
komparu :  
La fraŭlino parolas **kun** la malforta junulo.  
(kun > la du personoj estas en la sama loko - en la franca : "*parler avec...*")  
La leono prenas la sukeron **per** sia buŝego.  
(per > la buŝego estas la organo uzata por agi - en la franca : "*prendre au moyen de...*")



**Plurelekta demandaro**  
*laŭ verkoj de Robert Llorens*  
*eldonitaj de Espéranto-Info*

### 1 - gramatika

- a) ..... estas tio ? Tio estas bildo.  
1 - kion ; 2 - kiun ; 3 - kio  
b) ..... parolas ? Tiu-ĉi babilas.  
1 - kio ; 2 - kiu ; 3 - kia  
c) ..... bela fraŭlino ŝi estas !  
1 - kio ; 2 - kiu ; 3 - kia

### 2 - vorto-trezora

- ĉ) elektu "akcepti", "konfesi" aŭ "permesi" por traduki la francan "admettre"  
1 - recevoir : .....  
2 - comme vrai : .....  
3 - permettre : .....  
d) elektu "adreso", "lerteco" aŭ "sperto" por traduki la francan "adresse"  
1 - habileté : .....  
2 - expérience : .....  
3 - résidence : .....



**Superzam'**  
*proponita de*  
*Jean-François Cousineau*

- Kiu proponis en 1905 krei lingvo-kontrolajn instituciojn ?*  
a- Boirac b- Zamenhof c- Beaufront
- Kiu estas la titolo de la unua originala poezia verko en Esperanto ?*  
a- La vojo b- Mia penso c- Tagiĝo
- Kiu el tiuj muzikbandoj sukcese procesias multkoloro ?*  
a- Kajto b- Merlin c- Kaj Tiel Plu
- En kiu jaro forpasis Zamenhof ?*  
a- 1914 b- 1917 c- 1922
- Kiu korelativa finaĵo signas kvaliton ?*  
a- -el b- -es c- -a
- Kiu estas la plej longa rivero en la mondo ?*  
a- Amazono b- Jangzio c- Nilo

Plurelekta demandaro	Superzam'
<b>1 - gramatika</b>	
a : 2 ; b - 3 (mankis "riĉa" !); 3 : 2	1 c > 1887 ; 2 b > Valienne
<b>2 - vorto-trezora</b>	3 c > Kajto ; 4 b > 1859 ;
ĉ1 : ago ; ĉ2 : efiko ; ĉ3 : akcio	5 a > u
d1 : mildigi ; 2 : dolĉigi ; d3 : stompi	6 c > Venezuelo (El Salto Angel 979m)



## El la mesaĝkesto de la legantaro

### **Claude Longue-Épée**

Dankegon pro la sendo de via regiona gazeto. Mi ne jam havis tempon por komplete legi ĝin, kompreneble. Sed ĝi estas tre bele prezentita, kaj ŝajnas tre interesa !

*respondo de la red.*

*Dankon, Claude ! Vi nun scias, pri kio mi okupiĝas... kiam mi ne korektas nian same belan kaj interesan Nordan Gazeton.*

### **Jacques Ribon**

Mi bone ricevis la gazeton. Gratulon !

*respondo de la red.*

*Dankon, Jacques, ! Mi estas kontenta scii, ke nia gazeto estas legata en Aix-en-Provence.*

### **Monique Prezioso**

Alvenis bone la gazeto. Ni pretas labori por la sendo.

*respondo de la red.*

*Dankon al vi, Monique, kaj ankaŭ al la tuta skipo, kiu zorgas pri la printado, faldado, enkovertigo kaj sendo de la papera gazeto !*

### **Jean-François Cousineau**

Denove gratulon pro tiu plia kaj plu interesa gazeto... Pri la legantaro-mesaĝkesto, mi ja tre atente legis ĝin (kiel ĉiufoje...) kaj dankas vin pro viaj bonhumuraj kaj trafaj respondoj (ne nur pri mia mesaĝo)... Alia afero : mi rimarkis ke vi aŭdace (ĉu hazarde aŭ reagig-provoketcele ?) lasis iun strangan (!) "anke" en mia mesaĝo... Atentu pri la leganto-reagoj !!! (ĉu Philippe reagos pri tio ?)

*respondo de la red.*

*Rean dankon pro via nova komento, Jean-François ! Pri « anke » : mi tute vole lasis ĝin. Kial do mi ne akceptus, ke leganto Elgece skribus ? Ĉu Pironeca aŭ Nemereca, ĉu eĉ Piĉeca aŭ Neveseca... ĉiuj stiloj havas siajn virtojn, ĉu ne ?*

### **Thierry Spanjaard**

Dankon pro via belega bulteno ! Ĝia kvaliteco plialtiĝas je ĉiu eldono ! La enhavo estas ege interesa kaj la enpaĝigo estas pli kaj pli profesia !

Antaŭ kelkaj jaroj, Marsejlo, la ĉefurbo de nia regiono, estis preskaŭ neniam menciita en la federacia bulteno. Mi tute ĝojas vidi, ke nia Marsejla klubo estas pli kaj pli videbla en la federacia bulteno, same kiel en la urbo mem. Mi tamen konscias, ke ni daŭre devas pli labori por allogi pli da Marsejlanoj al la internacia lingvo kaj al nia movado.

*respondo de la red.*

*Eĉ se mi ne plu aludos pri mia kolo aŭ miaj maleoloj (ĉu vi memoras kion mi prie skribis en la antaŭa numero ?), mi tamen devas konfesi, ke viaj afablegaj vortoj plezure ruĝigis min, Thierry ! Tiu gazetkreado estas por mi unua provo per « Scribus », kiun mi provas iom post iom proprigi al mi.*

*Ankaŭ mi estas kontenta povi regule aperigi informojn pri via urbo. Sed tio eblas, nur ĉar ilin vi regule sendas al mi. Ĝojigus min paroli en nia gazeto ankaŭ pri okazaĵoj en Nice, Cannes, Toulon, Aix-en-Provence, Gap, Digne, Carpentras... se tie estus vera Esperanta vivo !*

### **Josée Lafosse**

Kun granda plezuro mi legis la enhavon de la sendita gazeto "Espéranto-Provence".

Ĝi estas belaspekta, riĉenhava dank' al la diversaj artikoloj kun bonega stilo kaj plie la paĝo por la komencantoj estas ne nur valora por la lernantoj, sed eĉ amuza.

Brave! Mi ege gratulas vin pro via konstanta laboro por via federacio (sekretario, redaktoro kaj enpaĝiganto...). Ŝajnas ke vi pasie laboras por redakti tian gazeton ! Do antaŭen " kun kredo, fervor' ", kiel diris Zamenhof.

*respondo de la red.*

*Dankegon pro viaj laŭdoj, Josée !*

*Mi ja ne povas nei, ke mi trovas plezuron en la redaktado kaj enpaĝigo de nia gazeto, kiu tamen povas plu vivi – mi tion jam ofte diris – nur danke al la kunlaborado de la gefederacianoj, kiuj sendas novaĵojn, artikolojn, fotojn ktp. Mi tute pretas iri « antaŭen », des pli, ke tiu esprimo estis la titolo de iama revuo (en la unua triono de la dudeka jarcento) de mia eksa « Dunkirka Eo-grupo ».*